

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

dimanĉon, la 6-an de Julio, 2014 • numero sep

Kio okazos hodiaŭ?

★ 9 atm –

12:30 ptm:

Kursoj (same kiel ĉiutage!)



★ 12:30, 1:30,

2:00 ptm

Kunvenu ekster la loĝejo

Lottie, Charlotte kaj Hoss gvidos grupojn en Viktorion laŭ buso n-ro 4. Kaj poste, ni ĉiuj venos al...

★ 3:00 – 4:00 ptm

Marmuzeo de Viktorio

Ni vizitos malnovan kortumon, kie okazos Esperantlingva teatra drameto pri Mathew Baillie BEGBIE, ankaŭ konata kiel “la pendigema juĝisto”

★ 7:30 ptm – 8:30 ptm

Student Union, Upper Lounge
Hiroyuki rakontos pri la nuklea katastrofo en Fukushima, pro kio li decidis forlasi Japanujon, kaj poste kiel li rigardas Ĉinujon, kie li nun laboras profesie per Esperanto.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstiron, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Ekskurso al la marmuzeo de Viktorio

Hodiaŭ Wally DU TEMPLE okazigos por ni drameton ĉe malnova kortumo en Viktorio.

Se vi volas iri frue por tagmanĝi en la urbocentro, **Charlotte gvidos grupon je 12:30. Serĉu ŝin en la Student Union Upper Lounge tuj post via kurs-kunsido.**


Se vi preferas tagmanĝi ĉe UVic, **Lottie gvidos duan grupon je 1:30 ptm.** Serĉu ŝin en la korto ekster nia loĝejo.

Kaj por ĉiuj aliaj, **Hoss gvidos trian grupon je 2:00 ptm.** Serĉu ankaŭ lin en la korto ekster nia loĝejo.

Ĉiu grupo trafos buson #4. La veturprezo estas \$2.50 por iri kaj alia \$2.50 por reveni. **La ŝoforo ne povas ŝanĝi monon, do nepre portu taŭgajn monerojn.**

Finfine ni kunvenos en la marmuzeo (“Maritime Museum”) je **3:00 ptm.** Ĝi troviĝas ĉe **28 Bastion Square.** (Vidu la mapon dekstre.)

Eniro estas senpaga por NASK-anoj, do **nepre portu vian NASK-nomŝildon**, kaj montru ĝin kiam vi eniros.



Koŝka adiaŭas nin

[Malfeliĉe, Koŝka (Morgan BONDELID) devis foriri frue; pasintjanuare ŝi konsentis ludi du rolojn en ŝekspiraj teatraĵoj, kiujn oni prezentos en Aŭgusto sur la Insulo Vidbeo en Vaŝingtonio. La provludoj komenciĝis dimanĉe, do ŝi devis adiaŭi nin. –Red.]



Karaj novaj amikoj,

Mi ĝojas, ke mi povis esti ĉi tie por la plejparto de NASK. Mi lernis multe, mi paroladis multe, kaj mi ĝuis multe. Subite, mi havas multajn Esperantajn amikojn de pluraj landoj. Mirinde!

Cetere, mi aktivas en Facebook kaj Google+, kaj retmesaĝo kaj tujmesaĝo bonas por kontakti min. Mi estos tre okupita ĝis Septembro (eble Oktobro), sed mi provos respondi... espereble ne tro malfrue. :)

Dankon pro ĉio, kion mi lernis ĉi-semajne.

—Morgan “Koŝka” BONDELID

P.S. – Se vi loĝas proksime kaj/aŭ interesiĝas pri la teatraĵoj, vidu <<http://islandshakespearefest.org>>.


Ĉi-somere ni prezentos *The Taming of the Shrew* – (“La Dresado de la Megero”, aŭ eble “La Malsovaĝigo de la Virinaĉo”) – kaj *King Richard III*. Mi rolos kiel la Vidvino en *Shrew* kaj la Reĝino en *Richard III*.

Mistera mapo de rivero “Pontina”

de Les KERR

Multaj NASKanoj vidis la misteran mapon de la rivero Pontina, supozeble parto de Esperantujo. Kaj aliaj aŭdis pri ĝi dum la prelego de Lottie ERICSON en la supera kurso.

La mapo mem aŭkciiĝos venontse-



majne ĉe la komuna kongreso en Sidnejo. Tamen, danke al tre saĝa propono de Derek ROFF, ĉi-matene mi trovis skan-servon en Viktorio kiu povas trakti tiel grandan paperon. La dosiero estas iom granda (400 MB), sed hejme mi transformos ĝin en pli taŭgan formon kaj disponigos ĝin per la reto.

Se vi volas ricevi sciigon, kiam la elektronika versio estas havebla, sendu retmesaĝon al <les@morsekob.org>.

Ĉu senintenca esperantaĵo?



Dankon al Steĉjo, kiu fotis tiun ŝildon (de supozeble vila strato) ie apud la kampuso.

Ĉu ni kreu NASK-T-ĉemizon?

de Logan HASER

Ĉu vi, ĉu vi, ĉu vi, ĉu vi volas krei?

Interreto ebligas al ni krei vestojn kun iu ajn bildo, kiujn ni deziras.

Do, mia ideo por ĉi-jara NASK-a ĉemizo estas ke ĉiuj, kiuj deziras, proponu vortludojn, poemojn, ks. por ke ni havu plurajn eblojn el kiuj ni povos elekti.

Eble ni povos voĉdoni pri oficiala frazo aŭ bildo por la jaro, kaj ankaŭ havi maloficialajn bildojn por via plezuro.

Bonvolu krei la plej bonan!

Morgaŭ ni kolektos kaj diskutos la ideojn.

Dankon kaj bonan verkadon!



En 2011 oni kreis T-ĉemizon kun esperantigita emblemo de la Universitato de Kalifornio, San-Diego, kie la kursaro tiam okazis.

La komenco de la mondo

de Nikvo WOODS

Aĉulo! Mi admonis ŝin kiam ŝi ebrigiĝis kaj decidis eksplodigi tutan sunsistemon ĉar ŝi pensis “ke tio estus bela”, sed ĉi-foje... Eble ŝi volis pruvi ke ŝi povas kaj krei kaj detrui; mi supozas ke tio estas laŭsenca en iu freneza maniero. Aŭ eble ŝi simple koketis tiun ĉarman bluhaŭtulon sidantan apud ŝi en la drinkejo. Sed mi ankoraŭ ne povas kredi ke ŝi kontraŭis la plej fundajn leĝojn de la universo kaj starigis novan planedon!

Se ni bonŝancos, ĝi simple iĝos senviva polvoglobo kiam ĝi malvarmiĝos. Aŭ, se inteligenta vivo evoluos tie, la ĉefspecio estos pacema kaj povos iĝi parto de La Respubliko. Sed se duono de la universo iĝos batalkampo kaj tiuj brutoj verŝos sangon... Nu, almenaŭ la Lakta Vojo estas for de preskaŭ ĉio kaj la loĝantaro de tiu misformita planedo ne povos ĝeni nin dum sufiĉe longa tempo.

Kontrolo pri tra plus -n

de Derek ROFF

Ĉu oni rajtas uzi la n-finaĵon post la prepozicio “tra”? Ekzistas du ekzemploj en PIV, ambaŭ zamenhofaj, kun la noto, ke tio donas emfazon. Ekzemple: “ŝi ĵetis rigardon tra la fenestran vitron”. Sed ĉu tio estas fakte strangaĵo, kiun Zamenhof uzis frue, kaj poste forlasis? Mi decidis enketi. Per la senpaga Tekstaro-serĉilo ĉe <<http://tekstaro.com>> oni povas serĉi datumaron/korpuson de preskaŭ kvin milionoj da vortoj, el libroj kaj periodaĵoj ekde la fruaj jaroj de Esperanto ĝis la nuna jarmilo. Per serĉado, oni povas trovi tre interesajn aferojn, ekzemplojn, kaj konstatojn pri la uzo de nia lingvo, pere de Zamenhof kaj aliaj gravaj verkistoj.

Pri la uzo de n-finaĵo post “tra”, mi trovis ekzemplojn de sep verkistoj (unu estas la grupo de britaj episkopoj, kiuj tradukis la Novan Testamenton), el kvin landoj kaj verŝajne kvin lingvoj. La plej frua estas el 1904, kaj la plej freŝa el 2001. Entute, mi trovis 16 unikajn frazojn. Do, ekde la komenco de Esperanto, la uzo estas tre malofta, sed neniam tute morta.